

JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2022-2023

| | |
|---|-----------|
| Enkonduko | 2 |
| 1. Konsciigo (Informado) | 2 |
| 1.1 Gazetara Komunikado..... | 2 |
| 1.2 Le Monde de l'Espéranto..... | 2 |
| 1.3 Esperanto-Aktiv'..... | 3 |
| 1.4 Foiroj..... | 4 |
| 2. Kapabligo | 5 |
| 2.1. Kulturcentroj..... | 5 |
| Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)..... | 5 |
| Kvinpetalo (Bouresse)..... | 5 |
| 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)..... | 6 |
| 2.3. Interretaj kursoj..... | 6 |
| 2.4. KER-ekzamenoj..... | 6 |
| 2.5. Komisiono Espéranto à l'école..... | 7 |
| 2.6. Afrika agado..... | 7 |
| 2.7. Ĝemelaj urboj..... | 8 |
| 3. Komunumo | 9 |
| 3.1. Butiko..... | 9 |
| 3.2. Sidejo..... | 10 |
| 3.3. Landa kongreso..... | 11 |
| 3.4. Preleg-turneoj..... | 11 |
| 4. Kunordigado kaj funkciado | 12 |
| 4.1. Rilatoj kun UEA..... | 12 |
| 4.2. Komitato kaj membraro..... | 12 |
| 4.3. Financoj..... | 14 |
| 5. Jarraportoj de la regionaj asocioj | 14 |
| 5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)..... | 14 |
| 5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)..... | 14 |
| 5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest..... | 15 |
| 5.4. Fédération Espéranto-Limousin..... | 15 |
| Korezo..... | 15 |
| Altvieno..... | 15 |
| Alie kun la Limoĝianoj..... | 16 |
| 5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)..... | 16 |
| 5.6. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)..... | 17 |
| 5.7. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)..... | 21 |
| 5.8. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)..... | 24 |
| 5.9. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)..... | 26 |
| 6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj | 28 |
| 6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)..... | 28 |
| 6.2. ILEI-Francio..... | 29 |

Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Espéranto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta la, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto:

Agrablan legadon deziras al vi,

La estraro de Espéranto-France.

1. Konsciigo (Informado)

1.1 Gazetara Komunikado

1.2 Le Monde de l'Espéranto

- Redakta teamo: Bruno Flochon, Emmanuelle Richard, Gilles Tabard. Grafika laboro : Emmanuelle Richard
- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Raymonde Coquisart, Lida Gabalda, Mireille Grosjean, Anne Jausions, Didier Loison, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Gilles Tabard, Renée Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La tekstojn kontrollegas Claude Jausions, Gilles Tabard kaj Pascal Villain.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Esperanto-France: <https://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>
- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.
- Aperis 2 numeroj en 2023/2024
 - numero 611: Les archives de l'espéranto
 - numero 612 : Les archives de l'espéranto (suite)

Raportis Emmanuelle Richard

1.3 Esperanto-Aktiv'

La reta informletero Esperanto-Aktiv', verkita en la franca lingvo, celas aperi ĉiumonate. Espéranto-France dissendas ĝin, de 2010, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 3000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe. Ekde 2022, la letero ne plu estas sendita perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn en <https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org

Rubrikoj

- **Découvertes** ("Malkovroj") prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** ("Okazis") listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Raymonde Cocquisart kaj Dominique Lacambre.
 - Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian

sperto.

- **Calendrier** (“Okazos”) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.
- **Lu, vu, ĉeĉouté ce mois-ci** (“Leginda, spektinda, aŭskultinda”) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

Redaktora teamo

Raymonde Coquisart (redaktado de rubriko “Ils l’ont fait...”), Dominique Lacambre (kalendaro), Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau (kunordigado, redaktado).

Listo de artikoloj

| Monato | N° | Malkovroj | Leginda, spektinda, aŭskultinda |
|---------|--------|--|--|
| 03/2023 | EU 136 | Jesper Jacobsen, membre de la Akademio de Esperanto | <i>La Longnazulo</i> , un conte de Wilhelm Hauff |
| 04/2023 | EU 137 | Andréa Bertrand nous parle de l’organisation du congrès de Lyon | <i>Memoraĵoj de Julia Agripina</i> , de Anna Löwenstein |
| 05/2023 | EU 138 | Le site libroj.org | <i>Cent jaroj da soleco</i> , de Gabriel García Márquez |
| 06/2023 | EU 139 | Tim Owen, responsable des éditions pour EAB | <i>Reĝo Ubuo</i> , d’Alfred Jarry, |
| 07/2023 | EU 140 | Debora, organisatrice du congrès mondial de Turin | Deux recueils de nouvelles de Julian Modest : <i>Mara stelo</i> et <i>Fera birdo</i> |
| 09/2023 | EU 141 | LSG, Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj | <i>L’esperanto par la méthode directe</i> , de Stano Marček |
| 10/2023 | EU 142 | Thierry Spanjaard et Pascal Vilain, réalisateurs de la chaîne YouTube EsKu | <i>La malamiko de Putin (L’ennemi de Poutine)</i> , de Kalle Kniivilä |
| 11/2023 | EU 143 | UEA Facila, avec Anna Löwenstein | <i>Inès en Okcitanio</i> , de Laure Patas d’Illiers |
| 12/2023 | EU 144 | Quelques idées pour un club de lecture | <i>Le Congrès des Villes-pont</i> , de Hannes Larsson |

1.4. Foiroj

Kiel kutime, Esperanto-Francilio partoprenis nome de Esperanto-Francio la foiron pri matematikaj ludoj, organizitan de Animath sur placo Saint Sulpice en Parizo de la 25a ĝis la 28a de majo 2023. La deĵoradon organizis Aurélien Lestage, kaj deĵoris naŭ volontuloj. Ĵaŭdon kaj vendredon partoprenis en la foiro multaj lernejoj, inter kiuj pluraj sekvis la tre sukcesan kurseton, kiun preparis Elisabeth Barbay pri nombrado kaj vortfarado. Venis krome multaj vizitantoj, al kiuj ni disdonis ĉefe kalendaretojn. Tiun ĉi agadon indos ampleksigi per preparo de specifa inform-materialo kaj daŭrigo de la kursetoj.

La homaran feston ni maltrafis, sed ni partoprenis en nova foiro Linguafest de la 29a de septembro ĝis la 1a de oktobro, en Halle des Blancs Manteaux (Paris 4^e). Ĝi estis provo relanĉi foiron similan al la malaperinta Expolangues, fare de Marc Oremland, fondinto de la muzeo Mundolingua, kun kiu ni ofte rilatas. La budo estis senpaga, sed esperantistoj finance helpis la foiron por kuraĝigi daŭrigon de tiu ĉi provo. Deĵoris sep volontuloj. Esperanto aperis ne nur en nia budo, sed en aliaj budoj kaj programeroj de la foiro, ni disdonis centojn da kalendaretojn kaj vendis librojn profite al Esperanto-Francio. Pluraj personoj interesiĝis pri la parizaj Esperanto-kursoj.

La sukceso de tiuj du partoprenoj en parizaj foiroj kuraĝigis nin mendi budon (kvankam ne senpagan) ankaŭ en la foiro pri edukado, de la 17a ĝis la 19a de novembro. Denove Aurélien Lestage organizis la deĵoradon kaj 16 esperantistoj deĵoris. Kun multnombra publiko ni havis tre bonajn kontaktojn, disdonis kalendaretojn kaj broŝurojn. La publiko, ofte liceanoj kun siaj familioj, montriĝis interesata kaj tie multaj junuloj aŭdis unuafoje pri Esperanto.

Tiuj ĉi sukcesaj spertoj instigas nin daŭrigi kaj eventuale ampleksigi nian partoprenon en foiroj, kaj se eble prepari sufiĉe longe antaŭe tiun ĉi partoprenon, ekzemple per preparo de specifa inform-materialo kaj de proponblaj kursetoj.

2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj

Kvinpetalo (Bouresse)

Ni ne ricevis raporton.

Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France plu estas komitatano de Greziljono ĝis 2024. Rerezentanto de Espéranto-France: Didier Loison. Jen raporto pri la civila jaro 2023.

Propraj staĝoj

- Entute: 77 tagoj, 2609 tranoktoj, 7087 preparitaj manĝoj, por 381 homoj el kiuj 108 nefrancoj kaj 47 infanoj.
- Printempa kursaro, ĥoro Interkant kaj jogo kun akvarelo en printempo.
- Naturisma semajno, Maratona kursaro, SAT-kongreso, Familia renkonto REF, staĝo *Échanges* kaj stud-sesio en somero.
- Staĝo *Aŭtune* kaj ĥoro Interkant en aŭtuno
- Laboroj kun volontuloj okazis dum 20 tagoj kaj aliaj semajnfinoj por ripari kaj ĝardenumi. Volontulu!

Aliaj okazaĵoj

- Luado al ne-esp-istaj grupoj por financi laborojn: 42 luoj dum 66 noktoj. E-istoj ĝuas rabaton!
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.
- Laboroj: La koridoroj de la 1a etaĝo estis farbitaj per hela tufa koloro. Daŭras la novigo de la kastelo tegmento. La kastelo estas konektita al la publika kloakreto.

Raportis Bert Schumann

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

2.3. Interretaj kursoj

2.4. KER-ekzamenoj

2.5. Komisiono Espéranto à l'école

Kvankam fine de nia lastjara raporto ni konsideris, ke nia celo estas atingita, ni iom pli plus agi. Do, ĉefe:

- *ni ricevis tri mesaĝojn aŭ leterojn de la DGESCO, kaj ni al ili sendis ses tiajn komunikilojn. Tamen, kiel kutime, iliaj respondoj ne sufiĉe kontentigis nin.*
- *ĉar la flugfolion pri la metodo Multlingva Akcelilo (MLA) aperigita pere de la eŭropa komisiono ne estis en la franca, ni tradukis ĝin.*
- *ni iomete helpis JEFO-n je ilia preparado de la video " Espéranto " fare de Linguisticae.*
- *ni sendis mesaĝon al 24 profesiaj instruistoj de nia movado por sugesti ilin eksperimenti la MLA-n. Bedaŭrinde, kiel ofte, neniu reagis krom du, al kiuj ni respondis la petitajn klarigojn.*
- *ni partoprenis al la Konferenco pri Eŭropo.*
- *fine, ĉar la dispozicio « Notre école, faisons-la ensemble » malfermis la pordojn al pli malpli ĉia eksperimento (kondiĉe, ke ili malpliigu neegalecojn inter la lernantoj kaj plibonigu ilian sukceson), kaj ĉar ni bedaŭrinde ne estas instruistoj, ni konsideris ne plu povi efike agadi. Tial, la 14an de Januaro 2023, ni informis nian prezidanton, ke nia komisiono ĉesas agi. Alivorte, laŭ ni, la pilko por enkonduki esperanton en la lernejojn estas nun en la manoj de nia movado!*

Raportis Guy Camy

2.6. Afrika agado

2.7. Ĝemelaj urboj

Daŭra problemo restas funkciigi veran komisionon pri ĝemelaj urboj. Mankas bonvolemluloj ...

Regule kunvenas geesperantistoj el ĝemelaj urboj i.a. Parizo/Romo, kiu perfekte funkcias. Daŭre partoprenas multaj partoprenantoj el diversaj landoj . Notinde kaj gratulinde ! Tre interesaj ankaŭ estas la legokluboj kun partopreno de aŭtoro.

Oftaj partoprenoj al retaj kunvenoj de Seŭlo tre interesaj ...

Regula ĝisdatigo de la paĝo Ĝemelaj urboj sur Fejsbuko kaj aperigo de informoj pri kunvenoj tra la mondo kaj pri kontaktoj kun Radio Havana kaj Pola Radio. Nuntempe estas 268 ŝatantoj kaj 277 kiuj regule sekvas la ĝisdatigojn de la paĝo. La nombro plialtiĝas iom post iom ...

Planoj daŭre restas planoj... Denove aperigi informojn sur la UEA Forumo, UEA facila kaj prepari artikolojn por la retejo de Esperanto France sen forgesi la reaperigon de la UEA Bulteno pri Ĝemelaj Urboj redaktita de la eks-delegito Wu Gojang el Ĉinio. Li pretas helpi sed havas novajn respondecojn kadre de loka agado. Ni ne sukcesis atingi niajn planojn sed esperas sukceson

Raportis Raymonde Coquisart

3. Komunumo

3.1. Butiko

Reta butiko: butik.esperanto-france.org

3.2. Sidejo

Viaj kolegoj en la sidejo de Espéranto-France elkore dankas vin pro via subteno dum la pasinta financjaro periode de septembro 2022 ĝis septembro 2023!

La sidejo funkciis bone kaj glate kiel pasintaj jaroj, grandparte pro fidela kunlaboro de niaj sekretario, informadikistoj, kasistoj, kaj ĉeestaj volontuloj.

Nin, en la sidejo, vizitis multaj homoj: Esperantistoj kaj ne Esperantistoj, enlandaj kaj eksterlandaj kies petojn ni traktis. Krome, ni ricevis kaj traktis ankoraŭ telefonavokojn, retmesaĝojn, paperajn korespondojn, Esperanto-rilatajn kaj aliajn administrajn korespondojn kiujn ni dissendis al la koncernaj respondeculoj en la estraro, kasisto, informadiko kaj Esperanto-Paris, kies sidejo estas samloka kun tiu de Espéranto-France.

Se iom detale paroli, ni en la sidejo:

Preparis kaj sendis 566 fakturitajn mendojn al niaj membroj, klientoj kaj aktivuloj.

Tio verŝajne ne estas tro ekonomia tamen danke al la profesia kunlaboro de nia informadiko kaj retbutiko, nia libroservo nuntempe vendas regule eĉ al eksterlandaj klientoj. Nia libroservo nuntempe estas bone konata en la Esperantujo.

Aĉetis kaj aranĝis 51 fakturitajn libro-aĉetojn de UEA, Sat-amikaro, Mondial, Kava Pech kaj aliaj.

Dissendis nian paperan organon LME (Le Monde de l'Espéranto) al niaj membroj kaj E-aktivuloj.

Dissendis la aliĝilon (bulletin d'adhésion 2023-2024), eĉ papere por memori la (re)aliĝon.

Registris kaj traktis (re)aliĝojn al Espéranto-France, ĉe tiuj (nov)membroj kiuj sendis ĉekon aŭ pagis kontante aŭ per sia bankkarto en la sidejo.

Peris la (re)aliĝojn al UEA kaj ILEI por tiuj membroj kiuj volis fari tion pere de Espéranto-France.

Aranĝis la abonojn al diversaj internaciaj revuoj por tiuj membroj kiuj volis fari tion pere de Espéranto-France.

Kunlaboris kun la informadiko por doni realajn ekzemplojn de la uzado, danke al kio kaj ĉiu-taga prizorgo far la informadiko, nuntempe nia sistemo Arthur, funkcias tre glate kaj la membroj povas facile aranĝi siajn membrec-aferojn sur Arthur.

Kunlaboris kun nia retbutiko por ĉerpi aŭtomatajn mendojn. Nia retbutiko multe faciligas nian laboron kaj bone diskonigas nian libroservon.

Helpis la esploristojn por serĉi en nia arkivo pri diversaj materialoj kaj ĉefe pri la sukcesas projekto Péraire (danke al Pascal Dubourg Glatigny) surbaze de unikaj materialoj de nia arkivo
<https://arkivo.esperanto-france.org>

Se vi volas viziti nin, trinki kafon kun ni, aĉeti librojn aŭ donaci viajn jam legitajn E-librojn kaj ĉefe personajn hereditajn Esperanto-arkivojn, ni volonte estas je via dispono.

Aktuale la Sidejo estas malfermita al la publiko lunde, marde, merkrede kaj ĵaŭde (tel.: 01 42 78 68 86).

Nia regula skipo surloke konsistas el Maria Fessl, Régis Fournier, Elisabeth Jouhaud, Viktor Simonnet kaj Said Baluĉi sed laŭ la bezono helpis nin ankaŭ Susanna Beglaryan, Liliane Bon, Méline Desnos kaj aliaj.

Komprenoble rete kaj en la sidejo multe helpis nin Emmanuelle Richard, Sébastien Montagne, Axel Rousseau, Paul Quevy-Lefevre, Régis Fabre, Claire Divoy, Bruno Flochon kaj aliaj.

Vi estas bonvena dum via vojaĝo al Parizo kaj tra Parizo. Ni plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn kaj respondos al viaj demandoj.

Raportis Said Baluĉi

3.3. Landa kongreso

La interasocia kongreso de Esperanto en Francio okazis de la 6-a ĝis la 8-a de majo, en Liono. La tri lokoj de la evento estis :

- « Domo de Italoj », agrabla loko kun grandega salono, kie okazis la akcepto kaj la plejmultaj agadoj,
- « Internacia Centro de Liono (CISL) », por loĝejo kaj kursoj,
- « Domo de Solidareco » por kelkaj eventoj.

120 homoj partoprenis la kongreson, inkluzive pluraj el Germanio.

Dum la 3 tagoj okazis : kunsido de la E-France komitato, ĝeneral asembleo, prelegoj (lumo estis la ĉefa temo), eksursoj en Lyon kaj Saint-Etienne, komuna manĝaĵo dufoje, du koncertoj.

La kompleta programo estas videbla sur la paĝo :

<https://esperantolyon.org/2023/02/12/programme-programo/>.

Malfermo de la kongreso

Sabaton matene okazis la malferma ceremonio de la kongreso. Bruno, la prezidanto de Espéranto France kaj Andréa Bertrand, la prezidantino de Esperanto Lyon, prezentis la lokan teamon.

La komitato kunvenis posttagmeze.

La loka komitato.

Ĝenerala asembleo de Espéranto France

La komitato dum la ĝenerala asembleo.

Bruno animis la ĝeneralan asembleon. Grava decido estas ke por la nova jaro, sekvante proponon de la prezidanto, la celonta budĝeto estas ekvilibra budĝeto.

Dum la asembleo, estis prezentata la rezulto de la voĉdono por la renovigo de la komitato.

Paul Quevy kaj Jean Lucien Mazeau prezentis la financon raporton de la pasinta jaro.

Prelegoj kaj prezentaĵoj

Pluraj prelegoj kaj prezentaĵoj okupis la plejparton de la kongreso.

Renée Triolle parolis pri la arkitekto Tony Garnier, kies modernistaj konstruaĵoj videblas en la urbo.

Rimarkindaj estas liaj pentritaj muroj ĉe altaj loĝdomoj.

Pentritaj muroj, rimarkindaj spuroj de la multaj faritaĵoj de Tony Garnier prezentitaj de Renée.

Bruno Robineau prelegis pri Titus Brandsma, nederlanda karmelana esperantisto.

Interesa estis la prelego de Emmanuelle Richard « Kiel eldoni en Esperanto », konsiloj, malfacilaĵoj, elturniĝiloj.

Michel Dechy instruas esperanton en diversaj kuntekstoj, ĉu en bazlernejoj ĉu en la universitato. Lia pedagogia eblas instigi lingvan lernadon.

Junulo el Liono, Marc-Olivier Graziani, kiu havas vendejon pri optikaj iloj por spac-observo, prezentis la plej novajn malkovrojn pri la observado de la kosmo per teleskopoj.

Marc-Olivier Graziani klarigis sian proprajn observojn de la kosmaj objektoj.

Marilou Cochard parolis pri la lumo kaj ĝia efiko sur la vivuloj, plantoj, bestoj, homoj.

Elizabeth Barbey prezentis sian valizeton de kartetoj por ludi kun infanoj esperante kaj ŝi bone klarigis kiel plezure uzi la buntajn kartojn. La valizo estas aĉetebla je modesta prezo.

Germana esperantistino interesigis pri la "infan-ludo" prezentita de Elizabeth.

Prelego de Pascale Voltaire temis pri La Fratoj Lumière, famaj lionaj sciencistoj, kiuj inventis kinon.

Ankaŭ estis prezentita la historio de la loka movado kun ĝemelaj kluboj el Frankfurto, Milano kaj Jokohamo.

LibroServo

Pri la libroservo zorgis Said. Estis disponeblaj libroj por infanoj, literaturaĵoj, manlibroj.

Mangaĵoj

Sabaton ni gustumis regionajn specialaĵojn alportitajn de la partoprenantoj. Surprizo estis la plado oferta de la loka teamo : varma kolbaso en briĉo kaj malmola fromaĝo kun aromaj herboj.

Dimanĉon estis proponita azia bufedo. Andrea klarigis, ke Liono estis je la fino de la silkvojo, kiu komenciĝis en Azio. Krome la bofilino de Andrea estas de kamboĝa deveno, ŝi kuiris la mangaĝon helpe de amikoj. Ni ege ŝatis tiun bufedon.

Muzikaj vesperoj.

Sabaton kantis *Radio Mondo*, du artistoj el Nederlando. La viro ludas akordeonon, la virino ludas fluton.

Dimanĉon ni aŭskultis la bonan pianiston kaj kantiston Gijom' Armide, kiu kantis siajn proprajn kanzonojn kaj ankaŭ tradukis kaj interpretis plurajn pecojn el la rok- opero Stelmanio.

La paro de Radio mondo.

Gijom' Armide, kantisto ... kaj humoristo.

Ekskursoj.

Ekskursoj estis proponitaj ĉiun posttagmezon por viziti la montetojn kaj kvartalojn de Liono. La unua al la monteto *Fourvière*, kie oni povis malkovri la faman bazilikon kaj la romian teatron. Poste oni piediris tra la stratetoj de la malnova urbo en la kvartalo de la katedralo.

La alia gvidis nin al monteto Rufa Cruco, kie videblas altaj malnovaj loĝdomoj kaj atelieroj de la silkteksistoj. Grandaj pentraĵoj ornamas murojn, kies perspektivo trumpas la okulojn.

Fine de la piedirado oni atingis *Place des Terreaux*, la viglan centron de la urbo.

Sabaton, la suno brilis dum la vizito de la lionaj kvartaloj.

La ekskurso al monteto Rufa Kruco komenciĝis kaj finiĝis en "Place des Terreaux".

Impona mur-pentraĵo. La reliefo estas nur optika iluzio.

La postkongresa ekskurso al Saint-Etienne ĝojigis la partoprenantojn. Ili vizitis la sepetagan domon sen ŝtuparo kun elipsa ramplo, kaj la museon de la minejo.

Ni ne partoprenis tiun ekskurson, ĉar la patrino de Lora kiu loĝas en la centro de Liono, bezonis helpo por prepari sian 100-jaran naskiĝdatan festenon.

Renkontoj

La kongreso estis okazo babilis esperante kun malnovaj kaj novaj amikoj. Kelkaj konataj aŭ nekonataj gejunuloj partoprenis la kongreson, ĉiuj ege simpatiaj. Mardon vespere ni malkovris la kulturen trinkejon KoToPo-n, kie ni ĝoje babilis, trinkis kaj finfine adiaŭis.

Germanio estis bone reprezentita

Strasburgo, la venonta kongreso.

Ulrich Brandenburg, prezidanto de la Germana E-a Asocio, ĉeestis la kongreson kaj fervore asertis, ke li agados por organizi kun la strasburganoj, la venontan eŭropan kongreson en Strasburgo.

Kompreneble ni ne povus rezisti aceti la belan verdan polocemizon, por la realigo de kiuj Bruno multe laboris, venditan en la libroservo, kaj ni fieras surmeti ĝin !

Konkludo : Bela, interese ga evento. Gratulon al la liona teamo kaj al la komitato de Esperanto France.

Joel&Laure - majo 2023

3.4. Preleg-turneoj

Ne okazis ĉi-jare

4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilatoj kun UEA

Michael-Boris Mandirola estas komitatano A ĉe UEA por reprezenti Espéranto-France por la periodo de 2022 ĝis 2025.

4.2. Komitato kaj membraro

Jaro 2023–2024

Por la jaro 2023, nova komitato estis elektita en majo 2023 en Lyon. La komitato kunvenis kvar fojojn: en majo 2023, en oktobro 2023, en januaro 2024 kaj kunvenos en majo 2024.

Reprezentas la membrojn (2023-2024):

Andréa BERTRAND ★ Raymonde COQUISART ★ Régis FABRE ★ Bruno FLOCHON ★ Xavier GODIVIER ★ Aleks KADAR ★ Michaël-Boris MANDIROLA ★ Jean-Lucien MAZEAU ★ Sébastien MONTAGNE ★ Marcelle PROVOST ★ Christine RAIFFAUD ★ Emmanuelle RICHARD ★ Bruno ROBINEAU ★ Paul QUEVY-LEFEVRE

Estraro (2023-2024):

- Prezidanto: Bruno Flochon
- Vic-prezidanto: Xavier Godivier
- Ĝenerala sekretario: Claire Divoy
- Vicsekretario: Emmanuelle Richard
- Kasisto: Paul Quevy-Lefevre
- Vickasisto: Jean-Lucien Mazeau
- Vickasisto + prelegvojaĝoj : Régis Fabre
- Estrarano: Christine Raiffaud


Reprezentantoj de la membraj asocioj (2023-2024):

- Aŭvernio: Rémi Deneu
- Bretonio: Laurent Peuch
- Francilio: Pierre Gauthier
- Limoĝio: Gilles Tabard
- Norda Francio: Claire Divoy
- Orientfrancio: Jean-Luc Thibias
- Provenco: Thierry Spanjaard
- JEFO (junuloj): Inès Kahin
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

Membraro:

Estis 589 membroj fino de 2023. Kontraŭ 616 membroj je la fino de la periodo 2021-2022 (30a de septembro 2022) kaj 612 membroj je la fino de la periodo 2020-2021 (30a de septembro 2021).

→ Répartition des membres en fonction de l'âge :



L'âge moyen est de 66 ans, l'âge médian 70 ans (la moitié des membres ont moins et la moitié plus de 70 ans). On constate une baisse de l'âge moyen par rapport aux années passées : 69 en 2018, 68 en 2020, 67 en 2022.

4.3. Financoj

Vd. la finanĉan raporton: <https://esperanto-france.org/finances/2023>

5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

Lokaj grupoj aŭ kontaktoj en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Morlaix.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

Membraro: ĉirkaŭ 100-150. Inter ili estas 59 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj 43 partoprenas al komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto kaj Espéranto Rennes).

Agoj de la federacio:

Prelegturneoj : ne okazis granda turneo ĉi-jare sed pluraj vizitoj de eksterlandanoj: tri Ĉinoj, unu de Ĉeĥio (en kvin lokoj), unu Polino kaj unu Usonano en lokaj grupoj sed ne okaze de turneo.

Financa helpo al Ukrainino Oksana kaj ŝiaj du filinoj kiuj loĝas en Bretonio, por vojaĝi al la UK de Italio dum la somero 2023.

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* kun 2 numeroj dum 2023 danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> administrantoj: Bert kaj Xavier.

Reta diskutlisto de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun 209 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis pli ol 100 mesaĝoj dum 2023.

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

Jara kunveno okazis en Loudéac, la 2an de aprilo 2023, kun 12 ĉeestantoj + 6 prokuroj.

Aliaj agoj de la lokaj asocioj kaj de membroj de la federacio

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Partopreno kiel staĝanoj aŭ organizantoj de pluraj Bretonoj al eventoj en la kulturdomo de Greziljono: interkant-staĝoj, somera programo kun komunaj 10 tagoj de Renkonto de Esperanto Familioj (REF) kaj tendumado de la Verdaj skoltaj. Eblas legi pri aliaj agadoj de lokaj asocioj en la lastaj numeroj de Verda triskelo.

5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest

5.4. Fédération Espéranto-Limousin

La asocio havas ĉirkaŭ 30 membrojn. Nia lasta Ĝenerala Asembleo okazis la 4-an de junio 2023 apud Brivo. Ni havas ĉiun jaron tri aŭ kvar komunajn babilkunvenojn en Korezo aŭ Alt-Vieno.

En Brivo, Korezo, ni partoprenis en du publikaj budoj, en septembro (Forum des Associations) kaj novembro (Marché des solidarités).

En Liceo d'Arsonval, ni denove prezentis esperanton dum unu horo al klaso de 2de kaj poste al kelkaj aliaj liceanoj. 2 el ili, (klaso Terminale), venis regule kelkajn monatojn por eklerni; ili haltis por prepari la ekzamenon sed pensas reveni poste.

Ni ankaŭ havas kurson por plenkreskuloj kun 3-5 homoj.

En Alt Vieno, ni partoprenis la festivalon por paco en oktobro en Saint-Junien.

Esperanta kurso okazas regule en Saint-Junien kaj nova kurso komencis en Limoĝo.

Nia venonta Ĝenerala Asembleo okazos la 1-an de junio apud Limoĝo.

5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Regiona kunordigado

Membraro. La Federacio nombris 50 membrojn (kp. kun 42 membroj en 2021-2022) laŭ la interasocia kotizosistemo:

- ★ Amieno: 4; Araso: 12; Lillo: 20;
- ★ individuoj-membroj: 12.

Federaciaj kunsidoj. Okazis federacia membrara jarkunveno la 11an de decembro 2022 en la jununargastejo de Lillo.

Rilato kun UFE. Michel Dechy reprezentis la Federacion en la landa komitato de UFE ĝis aprilo 2023, kiam Claire Divoy transprenis tiun taskon.

Informado kaj komunikado

Bulteno. La Federacio eldonis retan informbultenon *Norda Kuriero*. Ĝi aperis en decembro 2022 kaj aprilo 2023, kaj estas legebla ĉe <http://nordafrancio.fr/kuriero>.

Interreto. La Federacio lanĉis sian novan retejon ĉe <http://nordafrancio.fr> (alirebla ankaŭ per la adreso www.esperanto-hautsdefrance.fr), kunfandante sian propran retejon kaj tiujn de la membraj kluboj.

La Federacio estas en la sociaj retoj:

- ★ Facebook: www.facebook.com/esperanto.hautsdefrance
- ★ Instagram: www.instagram.com/esperanto.hautsdefrance
- ★ Whatsapp: unu grupo por la Federacio kaj unu grupo por la Lilla klubo.

